

Veranstaltungshinweise

Unsere **Esperanto-Lernrunden** für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen (Stufe A2¹⁾): Do. 19:00-20:30 Uhr, Gemeindehaus der kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1¹⁾): Do. 19:45-21:15 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – Unsere **monatlichen Vereinstreffen** sind vorgesehen für den **17.01.2008**, 19:30 Uhr in der Gaststätte *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen; den **21.02.2008**, 20:00 Uhr (**Jahreshauptversammlung**) in der Gaststätte *Landhaus*, Am Stadion 4, 26919 Brake; den **01.03.2008** in Nordenham mit **Vereinsbesenwerfen, Grünkohlessen zum Sattessen und Tanz**² (bitte bis zum 20.02.2008 bei Anne Höpken anmelden). Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

08.-10.02.2008	Esperanto-Wochenendkurse, ICH ³)
21.-28.03.2008	24. Printempa Semajno Internacia, Waldfischbach-Burgalben
11.-13.04.2008	Esperanto-Sprachkurse, ICH ³)
09.-12.05.2008	85. Deutscher Esperanto-Kongress, Essen
15.-18.05.2008	Printempa BARo 2008, Bad Münde
19.-26.07.2008	93. Esperanto-Weltkongress, Rotterdam, Niederlande
19.-21.09.2008	Esperanto-Sprachkurse, ICH ³)
31.10.-02.11.2008	Esperanto-Sprachkurse, ICH ³)
22.11.2008 (vortäufig)	EMAS ⁴)-Kulturtag, Bremen

¹Erläuterung d. Stufen: http://www.europass.cedefop.europa.eu/img/dynamic/c1349/type.FileContent.file.ELPEexamples_de_DE.pdf, S. 2; auf Esp.: <http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#691>

²Einzelheiten: http://www.esperanto.de/unterweser/balailjhetado_01032008.pdf

³ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

⁴EMAS: Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (Landesverb. Niedersachsen im Dt. Esp.-Bund e. V.)

Impressum:

Zeitschrift:

Erscheinungsweise:

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
dreimal jährlich als Druckausgabe und
elektronische Ausgabe, Netzseite:
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

Herausgeber:

Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion:

Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden):

Raiffeisenbank Oldenburg eG
BLZ 28060228
Kontonummer 1200160000
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 21

ISSN 1861-3330

Feb. – Mai 2008

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Rodenkirchen, 22.09.2007, Marktumzug: „Tulpen aus Amsterdam“? – Nein. „Auf nach Rotterdam!“ lautet unsere Devise. Mit Tulpen haben wir uns jedoch auch beschäftigt (s. Seiten 2 und 3).

Rodenkirchen, 22-a de Septembro 2007, foirprocesio: Ĉu "Tulipoj el Amsterdamo"? – Ne. "Ek al Roterdamo!" tekstas nia devizo. Pri tulipoj ni tamen ankaŭ okupiĝis (vidu paĝojn 2 kaj 3).

Kultura semajfino – Esperanto inter najbaroj en Eŭropo (Nordwalde, 19-a ĝis 21-a de Oktobro 2007)

En tiu ĉi aranĝo organizita de Esperanto Nederland kaj Esperanto-Societo Monastera partoprenis ĉirkaŭ 60 esperantistoj, ĉefe el Nederlando kaj Germanujo. Anne kaj Andreas ĉeestis kiel tagaj gastoj (en la 20a). En diversaj prelegoj ni estis bone informitaj pri la Tridekjara Milito, la utileco de pasportoj, la vivo de Andreo Cseh (konata Esperanto-instruisto) kaj bicikla rondiro tra Maroko. En la posttagmezo okazis ekskurso al Monastero kaj kunveno de Rejnland-Vestfalia Esperanto-Ligo. Ni tamen utilis kun kelkaj aliaj la sunan veteron por promeno tra la ĉirkaŭaĵo de Nordwalde. – Andreas



Ĝuante la Oktobro-sunon en Nordwalde / Beim Genießen der Oktobersonne in Nordwalde

An dieser von Esperanto Nederland und der Esperanto-Gesellschaft Münster organisierten Veranstaltung nahmen ca. 60 Esperantisten teil, hauptsächlich aus den Niederlanden und Deutschland. Anne und Andreas waren als Tagesgäste zugegen (am 20.). In verschiedenen Vorträgen wurden wir gut informiert über den Dreißigjährigen Krieg, die Nützlichkeit von Pässen, das Leben des Andreo Cseh (eines bekannten Esperanto-Lehrers) und eine Radtour durch Marokko. Am Nachmittag fanden ein Ausflug nach Münster und die Versammlung des Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Verbands statt. Wir jedoch nutzten mit einigen anderen das sonnige Wetter für einen Spaziergang durch die Umgebung von Nordwalde. – Andreas

Plant-agado

(Nordenham, 6-a de Oktobro 2007)

Kadre de la narcis-plant-agado en la muzeoparko de Nordenham dek du membroj de nia klubo plantmetis 300 bulbojn de la tulipo-speco "Esperanto". Antaŭe estis aranĝita bedo de trioble kvar kvadratmetroj. Esperanto-tulipoj floras en la koloroj ruĝa kaj verda – Andreas



Esperanto kreskas – ankaŭ kiel tulipoj / Esperanto wächst – auch als Tulpen

Enigma

	1	2	3	4	5
1					
2		6			
3					
4					
5		7			

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de brile ruĝa frukto.

Horizontale

1: insekto; 2: maliculo en la televidserio "Dallas" [mallongigo de liaj personaj nomoj]; 3: metalkunmiksaĵo el kupro kaj zinco [sen finaĵo]; 4: kare ŝatata; 5: hispane: ne; 6: enflua rivero de Mozelo [sen finaĵo]; 7: ĉiel simila (al alia) [sen finaĵo]

Vertikale

1: bulba akragusta vegetaĵo [kun finaĵo de adjektivo kaj akuzativo]; 2: riverfiŝo; 3: ekzistas; 4: forte, intense aŭdebla; 5: aldoni plibeligajn detalojn [sen finaĵo]

Dum nia kristnaskofesto en la 23a de Novembro 2007 en restoracio Ratskeller, Oldenburg / Während unserer Weihnachtsfeier am 23.11.2007 im Restaurant Ratskeller, Oldenburg



Meeresstrand

Ans Haff nun fliegt die Möwe,
Und Dämmerung bricht herein;
Über die feuchten Watten
Spiegelt der Abendschein.

Graues Geflügel huschet
Neben dem Wasser her;
Wie Träume liegen die Inseln
Im Nebel auf dem Meer.

Ich höre des gärenden Schlammes
Geheimnisvollen Ton,
Einsames Vogelrufen –
So war es immer schon.

Noch einmal schauert leise
Und schweiget dann der Wind;
Vernehmlich werden die Stimmen,
Die über der Tiefe sind.

Theodor Storm

Marostrand'

Lagunen flugas nun la mevo,
Kaj krepusko komencighas;
Super la malseketaj vadoj
La vesperlum' spegulighas.

Rapide flanke de la akvo
Glitiras griza birdaro;
En nebul' kushas la insuloj
Kiel songhoj sur la maro.

De la bolanta shlimo audas
Mi la misterplenon sonon –
Jam dechiam estis tiel –
Solecan birdovokadon.

Novan fojon tremas mallaute
Kaj poste la vent' silentas;
Audebligas la voĉoj, kiuj
Super la profundo estas.

El la germana esperantigis Andreas

**Postsomera Klaĉkunveno (PSKK)
(Zelem, Belgujo, 31-a de Oktobro ĝis 4-a de Novembro 2007)**

Ĉirkaŭ 80 plenkreskuloj, junuloj kaj infanoj el Belgujo, Nederlando, Francujo, Germanujo, Pollando kaj Litovujo partoprenis en tiu ĉi aranĝo en junular-gastejo en kampara ĉirkaŭaĵo. Programeroj estis interalie salso-danckurso, magia spektaklo, prezento pri la retejo de edukado.net kaj porprogresanta Esperanto-kurso. Ĝin gvidis la konata instruistino d-rino Katalin Kováts, kaj el ĝi rezultis ideoj kaj temoj ankaŭ por nia kluba lernrondo: Ekzemple por akceli la paroladon, la kursanoj unue intervjuis sin duope unu post la alia (pri profesio, libertempo-okupiĝo, familio, aliro al Esperanto ktp.). Poste ĉiu kursano prezentis al ĉiuj la de li intervjuiton en mallonga monologo.



*Kalte Schulter, heiße Rhythmen:
Tanzkurs / Malvarma ŝultro, varmegaj
ritmoj: danckurso*

Por iom pligajigi la aferon, kelkaj prezentantoj estis petitaj pri certa parolstilo: parolstilo de pastro, sportraportisto, generalo, „Renato-stilo” ktp. Krome Katalin prezentis skemon, kiu estas rekomendita fare de Konsilio de Eŭropo por pritaksi lingvoposedon (pli: paĝo 8, piednoto 1). – Andreas

**Nachsommerliches Klatschtreffen (PSKK)
(Zelem, Belgien, 31.10.-04.11.2007)**

Etwa 80 Erwachsene, Jugendliche und Kinder aus Belgien, den Niederlanden, Frankreich, Deutschland, Polen und Litauen nahmen an dieser Veranstaltung in einer Jugendherberge in ländlicher Umgebung teil. Programmpunkte waren u. a. ein Salsa-Tanzkurs, eine Zaubervorstellung, eine Präsentation über den Netzauftritt von edukado.net und ein Esperanto-Kurs für Fortgeschrittene. Ihn leitete die bekannte Lehrerin Dr. Katalin Kováts, und daraus ergaben sich Ideen und Themen auch für unsere Vereins-Lernrunde: Beispielsweise um das Sprechen zu fördern, befragten sich zunächst die Kursteilnehmer zu zweit einer nach dem andern (über Beruf, Freizeitbeschäftigung, Familie, Zugang zu Esperanto usw.). Dann stellte jeder Kursteilnehmer den Befragten allen in einem kurzen Monolog vor. Um die Sache etwas lustiger zu machen, wurden einige Darbieter um einen bestimmten Sprechstil gebeten: Sprechstil eines Pfarrers, Sportberichterstatters, Generals, „Renato-Stil” usw. Außerdem präsentierte Katalin ein vom Europarat empfohlenes Schema zur Bewertung von Sprachbeherrschung (mehr: Seite 8, Fußnote 1). – Andreas

**Pflanzaktion
(Nordenham, 06.10.2007)**

Im Rahmen der Narzissen-Pflanzaktion im Museumspark von Nordenham setzten zwölf Mitglieder unseres Vereins 300 Zwiebeln der Tulpensorte „Esperanto”. Zuvor war ein Beet von dreimal vier Quadratmetern angelegt worden. Esperanto-Tulpen blühen in den Farben rot und grün. – Andreas

**La 4-a Rata Rendevuo
(Hessisch Oldendorf, 23-a de Septembro 2007)**

Ĉirkaŭ 30 esperantistoj, el ili Alke kaj Andreas de nia klubo, partoprenis en tiu ĉi aranĝo okaze de la 20-jariĝo de Esperanto-Gruppe Hameln. Unue ili ĝuis interesan gvidadon tra privata kolektaĵo de malnovaj aŭtoj, ĉefe de la speco Volkswagen. La rakontoj de nia gvidanto estis tre amuzaj, ankaŭ al tiuj, kiuj ordinarne ne tre entuziasmiĝas pri aŭtoj: Ekzemple dum ferioj en Kipro li tute ne-atendite malkovris unue metiejon kun Volkswagen-partoj, el kiuj li iom post iom aĉetis kelkajn. Poste li vidis eĉ tutan Volkswagen, kiun li ankaŭ aĉetis por ekhavi praktikan ujon por la transporto de la partoj – ekde tiam lia edzino elektas la ferioĉelojn. Filmfaristoj iafoje prunteprenas „juvelojn” el la kolektaĵo. Plia programero estis la vizito de la konvento de Fischbeck. En ĝia kriptoj Marita kaj Miriam de la muzikgrupo Kajto duvoĉe kantis malnovan hispanan kanton. Tio ĉi estis bele aŭdebla sinpreparo al la koncerto de Kajto en Fuhlen en la fino de tiu ĉi sukcesa rendevuo. – Andreas



Der letzte Käfer / La lasta skarabo

**Das 4. Rata Rendevuo („Ratten-Treffen”)
(Hessisch Oldendorf, 23.09.2007)**

Etwa 30 Esperantisten, unter ihnen Alke und Andreas von unserem Verein, nahmen an dieser Veranstaltung anlässlich des 20jährigen Bestehens der Esperanto-Gruppe Hameln teil. Zunächst erfreuten sie sich einer Führung durch eine private Sammlung alter Autos, hauptsächlich der Marke Volkswagen. Die Erzählungen unseres Führers waren sehr amüsant, auch für diejenigen, die sich für gewöhnlich nicht sehr für Autos begeistern: Beispielsweise entdeckte er in den Ferien auf Zypern völlig unerwartet zunächst eine Werkstatt mit Volkswagen-Teilen, von denen er nach und nach einige kaufte. Dann sah er sogar einen ganzen Volkswagen, den er auch kaufte, um einen praktischen Behälter für den Transport der Teile zu bekommen – seitdem sucht seine Frau die Ferenziele aus. Filmemacher leihen sich gelegentlich „Juwelen” aus der Sammlung aus. Ein weiterer Programmpunkt war die Besichtigung des Stifts von Fischbeck. In seiner Krypta sangen Marita und Miriam von der Musikgruppe Kajto zweistimmig ein altes spanisches Lied. Das war eine schön anzuhörende Einstimmung auf das Konzert von Kajto in Fuhlen am Ende dieses gelungenen Treffens. – Andreas

**EMAS-Kulturtago 2007
(Oldenburg, 13-a de Oktobro 2007)**

En tiu ĉi aranĝo en salono de StadtHotel Oldenburg partoprenis dudek kvar germanoj, du nederlandanoj kaj du hungaroj. Estis reprezentitaj la malsuprasaksaj kluboj de Unterweser, Herzberg kaj Hameln kaj krome tiuj de Bremen kaj Groningen (Nederlando). Unue la Herzberg-anoj Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy informis pri la aktuala Esperanto-agado en Herzberg: pri rilatoj kun esperantistoj



Zuhölerschaft / Aŭskultantaro

en la pola ĝemelurbo Góra, pri Esperanto en lernejoj, pri kursoj kaj pri multaj aliaj atingaĵoj por kaj per Esperanto en Herzberg. Ĝi ja ekde Julio 2006 estas oficiale nomata Esperanto-urbo: Danke al la agado de la tieaj esperantistoj Esperanto ĝuas la subtenon de la urbestro kaj de ĉiuj partioj reprezentitaj en la urba administracio. Sekvis prelego de Uwe Joachim Moritz pri Oldenburg(i)o, t. e. pri la urbo kaj iama lando. Li ankaŭ informis pri la Oldenburg(i)a Esperanto-vivo, en kiu li partoprenas – tamen kun longa paŭzo – de kelkaj

jardekoj. Dum la aranĝo la partoprenantoj havis la eblaĵon akiri broŝurojn k. s. pri Herzberg, Esperanto-artiklojn kaj librojn (iujn malnovajn librojn eĉ senkoste). Krome en aparta salono kelkaj kulturtag-organizantoj per germanlingva prelego kaj ekspoziciitaj libroj kaj revuoj informis pri Esperanto vizitantojn, kiuj pri ĝi interesiĝas kaj estis legintaj anoncojn pri la kulturtago en la loka gazetaro. Laŭ la "eĥo" oni eĉ povas aŭdace konjekti, ke en Oldenburgo estas okazonta nova Esperanto-kurso! (Sed ni ne ĝoju tro frue.) Almenaŭ laŭ la vidpunkto de reklamo evidente estis bone okazigi tian aranĝon ne en loko izolita ie en la kamparo, sed en loko kun sufiĉe da publiko-trafiko kiel tie en Oldenburgo, ĉu ne? Post la bongusta tagmanĝo okazis la jarĉefkunveno de Esperanto-Ligo de Malsupra Saksujo (EMAS). Rezultato de la elektoj: prezidanto: Thomas Heberlein; vicprezidanto: Gerhard Weber; kasisto: Peter Zilvar; asessoroj: Robert Weemeyer, Udo-Eugen Klingenberg, d-ro Klaus Schlüter kaj Heinz-Wilhelm Sprick. La aranĝo finiĝis per prelego de Harald Schicke, prezidanto de Internacia Naturkuraca Asocio pri "Konsideroj de naturkuracisto pri la trinkaĵoj de niaj najbaroj". En ĝi li klarigis la sanajn kaj ne-sanajn ecojn de akvo, kafo, teo, fruktosuko, limonado, bionado, vino kaj – plej detale, ĉar tio estas sia specialaĵo – biero. Elkoran dankon al la organizantoj, precipe al Alke Geveke, Anne Höpken kaj Brigitte Kranz de Esperanto-Gruppe Unterweser kaj Thomas Heberlein de Esperanto-Gruppe Hameln. Estas intencate, ke la EMAS-Kulturtago 2008 okazos komune kun esperantistoj de Bremen kaj vizitantoj el la amikiĝinta Esperanto-grupo de Groningen en Bremen en Novembro 2008. Jen la retejo de EMAS:

<http://www.esperanto.de/niedersachsen>. – D-ro Klaus Schlüter, Andreas

**EMAS-Kulturtag 2007
(Oldenburg, 13.10.2007)**

An dieser Veranstaltung in einem Salon des StadtHotels Oldenburg nahmen vierundzwanzig Deutsche, zwei Niederländer und zwei Ungarn teil. Es waren die niedersächsischen Vereine Unterweser, Herzberg und Hameln sowie die von Bremen und Groningen (Niederlande) vertreten. Zunächst informierten die Herzberger Peter Zilvar und Zsófia Kóródy über die aktuelle Esperanto-Aktivität in Herzberg: über Beziehungen mit Esperantisten in der polnischen Partnerstadt Góra (Guhrau), über Esperanto in Schulen, über Kurse und viele andere Errungenschaften für und mittels Esperanto in Herzberg. Herzberg wird ja seit Juli 2006 offiziell Esperanto-Stadt genannt: Dank der Aktivität der dortigen Esperantisten erfreut sich Esperanto der Unterstützung des Bürgermeisters und aller in der Stadtverwaltung vertretenen Parteien. Es folgte ein Vortrag Uwe Joachim Moritz' über Oldenburg (Stadt und ehemaliges Land). Er informierte auch über das Oldenburger Esperanto-Leben, an dem er seit einigen Jahrzehnten teilnimmt – allerdings mit einer langen Unterbrechung. Während der Veranstaltung hatten die Teilnehmer die Möglichkeit, Broschüren u. Ä. über Herzberg, Esperanto-Artikel und Bücher zu erwerben (manche alte Bücher sogar kostenlos). In einem separaten Salon informierten außerdem einige Kulturtag-Organisatoren mit einem deutschsprachigen Vortrag und ausgestellten Büchern und Zeitschriften Besucher über Esperanto, die sich dafür interessieren und Annoncen über den Kulturtag in der örtlichen Presse gelesen hatten. Nach dem „Echo“ kann man sogar gewagt vermuten, dass in Oldenburg ein neuer Esperanto-Kurs bevorsteht! (Aber freuen wir uns nicht zu früh.) Zumindest unter dem Gesichtspunkt der Werbung war es offensichtlich gut, eine solche Veranstaltung nicht in einem abgelegenen Ort irgendwo auf dem Lande abzuhalten, sondern an einem Ort mit ausreichendem Publikumsverkehr wie dort in Oldenburg, oder? Nach dem schmackhaften Mittagessen fand die Jahreshauptversammlung des Landesverbandes Niedersachsen im Deutschen Esperanto-Bund (EMAS) statt. Ergebnis der Wahlen: Vorsitzender: Thomas Heberlein; zweiter Vorsitzender: Gerhard Weber; Kassenwart: Peter Zilvar; Beisitzer: Robert Weemeyer, Udo-Eugen Klingenberg, Dr. Klaus Schlüter und Heinz-Wilhelm Sprick. Die Veranstaltung endete mit einem Vortrag Harald Schickes, des Vorsitzenden des Internationalen Naturheilkunde-Bundes, über „Betrachtungen eines Naturheilkundlers über die Getränke unserer Nachbarn“. Darin erläuterte er die gesunden und ungesunden Eigenschaften von Wasser, Kaffee, Tee, Fruchtsaft, Limonade, Bionade, Wein und – am ausführlichsten, weil es seine Spezialität ist – Bier. Herzlichen Dank an die Organisatoren, besonders an Alke Geveke, Anne Höpken und Brigitte Kranz von der Esperanto-Gruppe Unterweser und Thomas Heberlein von der Esperanto-Gruppe Hameln. Es wird beabsichtigt, dass der EMAS-Kulturtag 2008 gemeinsam mit Bremens Esperantisten und Besuchern von der befreundeten Esperanto-Gruppe Groningen im November 2008 in Bremen stattfindet. Hier der Netzauftritt von EMAS: <http://www.esperanto.de/niedersachsen>. – Übersetzung: Andreas